

La vorto pridemandas nin - renkontiĝoj

Kiam la konscio estas duondormema

reprilaboro de Giuseppe Castellese

Ne ŝajnas konvene prisilenti ke la malfermo de la kunveno en Cefalù fare de la ĉefepiskopo de Palermo donis novajn efikecon kaj signifon al la iniciato de la misiista Komunumo de la Evangelio. Se antaŭe la kunveno montris signojn de "suspekta" etoso kun singardaj distanciigoj, ĉi jare multaj homoj devis konstati la validecon de la servo donita al la Eklezio kaj plie ili devis esprimi konsenton al la subtena strukturo de la kunveno en kiu havas gravan rolon la biblisto patro Alberto Maggi. Kaj estas de li ke ni startos por malplekti la parolfadenon por provi novan kontakton kun la Evangelio ĉefe flanke de laikaro ĉiam pli sopiranta je aŭtentika kaj tuja Vorto de Dio. Se la senĉesa rimarko de la nekongruoj je la jerusalema pastraro kiu murdas "la filon de la homo" povos esti transigita al la nuntempo sen iu protesta ribelo, tio egalos diri ke el Cefalù oni prilaboras la antaŭsignojn por la alveno de novaj ekleziaj strategioj.

Kiam la Vorto fariĝas revigligo

Vendrede la 16^a de Novembro, je la horo 9,15 (unua parto)

mi malsatis, kaj vi ne donis al mi manĝi (mt. 25,42)

Ne Mesio sed filo de la homo

Fakte kun Alberto Maggi, la Vorto vin enpenetras kaj vin revigligas; la vortoj, kiu alfoje vin oscedigis, tie fariĝas adrenalino: "ĉiu detalo en la Evangelio estas grava" tial ĉiu ĝia esprimo devas esti zorge konsiderita kaj gustumita.

"Kiam la filo de la homo venos en gloro kun ĉiuj la anĝeloj, tiam li sidiĝos sur la trono de sia gloro". Jesuo ne sin proklamas Mesio. Kaj, do li ne estas "la atendita milita reĝo" sed li estas "la filo de la homo, kiu laŭ la koncepto de la Malnova Testamento estas "homo entenanta en si mem la dian kondiĉon"; tial Jesuo elektas por si tiun kvalifikon.

En ne malsimilaj vortoj, Filo de la homo estas kiu atingis la plej altan gradon de humaneco kaj en tio Li renkontas la dian kondiĉon: li estas la homo-Dio, sed tio ne estas apartaĵo de Jesuo, kaj estas io mirinda, sed ja ĝi estas ebleco kiu pere de Jesuo transdoniĝas al ĉiuj homoj: en la kreitaro la homa modelo enhavas la dian kondiĉon. Kiam la filo de la homo disvolvigis, liberigis, potenciigis en la plej alta grado sian humanecon, kiam li fariĝas vere ĝisfunde homa, tiam lirenkontas la diecon kiu kuŝas en li mem.

Tiu estas ne sen sinsekvaj konstato.

Kiam Jesuo anoncos sian Pasionon, li ne diros ke la Sinedrio, la ĉefsacerdotoj, la farizeoj, la estroj kontraŭas la Mesion. Fakte la Mesio estis atendita, ĉiuj preĝis pro lia alveno kaj poste, kiam Jesuo eniras Jeruzalemon, la popolo, la homamaso lin akلامas dirante "reĝo, filo de Davido". Certe tiuj uloj ĉion miskomprenas, ĉar Davido, iu tipa tiutempa sikario, inauguris la regno de Izraelo per la povo de la armiloj. Jesuo, kontraŭe, estas la filo de la homo nome tiu kiu similas la patron kaj havas sintenon similan al Lia"; kaj, do li ne estas la atendita Mesio. Rememoru tion ankoraŭfoje: Ĉiuj en Jeruzalemo laŭdegas Jesuon per "hosana" ("Sinjoro nun savu nin")! Sed hosana al kiu? La respondo estas.... "al la filo de Davido!" Kaj la bedaŭro estas, je tiu ĉi punkto, ke ni mistikemaj, eĉ nuntempe ripetas tiun esprimon, sen ĝin kompreni!

Sed jen alvenas la seniluziigo de la popolamaso kiu ne komprenas; en Jeruzalemo, post malmulte da tempo, la sama popolamaso komprenas ke li eraris pri la homo! Jesuo ne estis kiu per la perforto estos inaugurinta sian regnon, sed li estis la Difilo; li ne estis la venĝinto sed kiu sin pretigis doni sian vivon. La gloranta amaso post kvin minutoj ŝanĝas la tonon.... kaj, do, krucumu Lin!

Ni specifas pli bone: la abomeno de la institucioj al Jesuo kiu ilin puŝos ĝis Lin mortigi, tiu ne direktiĝas al Mesio, al profeto, al sendito de Dio: la institucioj (kaj, do, ĉiuj institucioj?) sin metas kontraŭ "la projekto de Dio por la homaro". Kial? Tio estas tuj dirite: por la institucioj ne penseblas ke la homo povu atingi tie kaj tuj (dum tiu ĉi tera vivo) la dian kondiĉon: tiu afero... kolizias kun la avantaĝo de sacerdota rango, tio, por la kasto, estas krimo meritanta mortigon. Nur la mortigo, en la sacerdota imagaro povas haltigi tiun ilian "ruinigon".

La invento de la peko.

Kaj tiel la religia institucio "inventas" la pekon, ĝi encerbigas al homamaso la kulposenton per kiu ĝi sentigas la homojn ĉiam malindajn kaj, super ĉio bezonantajn je sacerdota perado por ricevi la pardonon. Per ĝia avido la religia institucio sukcesis fosi abismon inter Dio kaj la homoj: tiuj kvankam multege streĉu siajn fortojn, ili ĉiam estos malindaj kaj ĉiam kulpaj kaj neniam ili sukcesos atingi la Sinjoron. La ruinigan admonon ni trovas en "Levidoj": Ĉio vin malpurigas kaj se vi estas malpura neniam vi povos kontaktigi kun "la pureco", kun la medio de la absoluta sankteco kiu estas Dio. La nura rimedo, la nura enirvojo estas la purigo pere de la sinturno al la religio, al la sacerdotoj, al la templo. La religiularo per misforma vizaĝo de Dio mastrumas ĉefverkon de regado: la povon sur la homaro. Tiel tuj kiam Jesuo parolas, subite leviĝas alarmo: estas frenezulo kiu ĉirkaŭiradas dirante ke ĉiu homo povas mem atingi Dion kaj ke la plano de Dio por la homaro estas fandiĝi kun li!

La novaĝo de Jesuo.

Jen la novaĵo de Jesuo: Dio tiom amis la homon ke Li deziras ke la homo havu la saman dian kondiĉon, nome ke la homo fariĝu Dio.

La mesaĝo proponita en situacio de pasinteco, ŝajnas celi la protekton de iuspeca sendanĝereco por la nuntempo. Kaj tamen la mesaĝo, pripensita de la nuntempa homo, jam de la premisoj aperas kiel disŝira antaŭenpuŝo al "vekiĝu, ho vi, kiu dormas!"

Diri ke la homo havas la saman dian kondiĉon estas treege danĝera afero. Diri ke Jesuo, filo de la homo, estas modelo de la realigita persono kaj ke tiu realigo eblas por ĉiuj.. tiu estas la fino, la ruiniĝo por la religiularo.

Ni observu ilin kun ilia bindita kapo inter siaj manoj, ĉiuj la sacerdotoj de la templo! Sed kiel? (ni povus senti ilin vei!) antaŭ plurjarcentoj ni sukcesis konvinki la homojn pri nia nepreco, pri la fakto ke ili ne povas direktiĝi rekte al Dio sen nia perado; ni diras ke Dio estas atingebla ne ie ajn, sed en bone difinita loko (la templo) kie estas preparitaj konvenaj formularoj (la liturgio) kaj super ĉio laŭ la leĝo, la torao, en la ple etaj detaloj! Kaj kontraŭe...." tiu freneza instiganto (Jesuo)" sin permesas?!

La revolucia mesaĝo de Jesuo

La mesaĝo de Jesuo estas vere revolucia: ĝi renversas ĉiujn planojn; li estas frenezulo kiu krizigas la tutan religian institucion. Ni daŭrigos, do, miri ne pro la fakto ke Jesuo estis mortigita, sed pri la fakto ke li sukcesis tiom longe vivi.

La humanigo pri kiu parolas Jesuo ne estas honoro rezervita nur al derviŝoj retiriĝintaj en monaĥejo aŭ en la dezerto por manĝi lokustojn, sed ĝi estas je ĉies ebloj.

Kaj, do, ju pli ni estas homaj des pli ni fariĝas diaj.

La ateismo de la religiulo

La religiulo, male, estas ateista ĉar li estas nehoma: por la religiulo pli gravas la "bono de la doktrino" ol la "bono de la homo". Nu el la Evangelioj evidentiĝas ke por Jesuo ne ekzistas absoluta valoro krom "la bono de la homo". Kiam al la bono de la homo surmetigas doktrinon, tiu povas esti nur diabla. Por Jesuo ekzistas neniu alia celo plej grava ĉe la horizonto de la kredanto ol la bono de la homo.

Tial Jesuo ne petas eksterordinarajn religiajn praktikadojn, sed Li limiĝas nin peti ke ni estu intense homaj, nome tiaj ke ni estu atentaj al la suferoj de aliuloj, ke ni iru remkonten al aliuloj por nin meti je ilia servo. Kaj tie vi perceptas ke vi estas en intima rilato kun Dio. Kaj tiam, kial serĉi la sacerdoton? Kaj, do, por tiuj povrujoj alvenas "la bankroto"! Sed estas eĉ la fino de la religia institucio. Vi ne plu devos alporti al la templo la kaprion! Vi simple devos pardoni por esti pardonita!

Pardonu, kaj vi estos pardonitaj, diras Jesuo. Kaj la popolamaso kredas je Li. Sed trans la templo la sacerdotoj reeĥas la vortojn de Jesuo: oni devas mortigi tiun ulon, male, hodiaŭ ni manĝos malpli! Jesuo respondas per sia saĝo: Li maldiigas ĉion kion oni opinias sanktan kaj, anstataŭe Li diigas la homon, la bildon de la Patro.

Kiam Jesuo revenos en gloro

La vojo ĝis tie irita nin rekondukas al nia komenco. Tiu homo mortigita, krucumita por lin montri kiel malbeniton de Dio, tiu sama homo revenos en gloro (kiel esprimo de la dia kondico) "kaj ĉiuj la senditoj revenos kun Li". Kiu estas tiuj senditoj? Kutime per la vorto senditoj aŭ heroldoj oni indikas la anĝelojn, sed ĉifoje tiuj senditoj ne estas devige spiritaj estaĵoj; la senditoj kiuj aperas flanke de la filo de la homo estas tiuj samaj (kiomaj) Lin akceptis, kaj akceptis Lian mesaĝon, kaj pere de la sekvantaro de Jesuo fariĝis "senditoj de la Sinjoro", nome videbla revelacio de nevidebla Dio: la popolamaso ne vidas Dion; la homaro ne povos kredi ke Dio estas mizerikordo se ĝi ne vidas manifestiĝi en ni la mizerikordo mem kaj la samo okazas por la Providenco. Kaj, do, la anĝeloj kiuj aperas kun la Filo de la homo estas "la senditoj de la Sinjoro". Ili estas tiuj kiuj akceptis Lian mesaĝon kaj ke kun Li kaj kiel Li orientigis sian vivon al la bono.

Mardo, la 8 an de januaro 2008